Eŭropa Bulteno

Septembro 2011, Numero 108

2012 – LA JARO DE TIBOR SEKELJ

Dum sia kopenhaga konferenco la Asembleo de EEU decidis proklami la jaron 2012 la JARO DE TIBOR SEKELJ.

Tibor Sekelj naskiĝis la 14-an de februaro 1912 kaj en la jaro 2012 ni festas 100-jariĝon de tiu gravega kaj tre interesa esperantisto. Tiuj kiuj ne scias multon pri li, bonvolu legi la artikolon en E-a vikipedio: http://eo.wikipedia.org/wiki/Tibor_Sekelj
Li kiel multflanka persono kaj sukcesa esploristo de nekonataj teritorioj de la Tero kaj tiusence ankaŭ aventuristo estas tre alloga por la ĝenerala publiko kaj povas esti inspira por verkistoj de artikoloj kaj informoj pri li. Pro tio tiu ĉi centjariĝo estas ege bona preteksto por pere de aktivadoj rilataj al li informadi pri Esperanto.
Necesas krome diri ke li estis sendube unu el la plej gravaj esperantistoj en la ĝisnuna E-historio: Li fondis 8 landajn E-asociojn en Azio kaj Sudameriko, li fondis kvardekon da E-societoj en minimume 10 diversaj landoj, li aktive reprezentis UEA en pluraj UNESCO-konferencoj kaj en tiu de 1985 en Sofio atingis akceptigon de la 2-a rezolucio kiu agnoskas Esperantan agadon en kultura sfero, li gvidis novtipan internacian organizon IOE dum deko da jaroj kaj grave influis al malfermado de la movado, li verkis dekon da libroj en E, redaktis tri E-revuojn, estis prezidanto de Geografia E-Asocio, Asocio de E-Verkistoj, direktoro de IOE (instituto por Oficialigo de Esperanto) ktp.



Tiusence ni invitas ĉiujn mondajn esperantistojn, kaj aparte la eŭropajn engaĝiĝi en iu el la jenaj proponataj aktivecoj dum la Jaro de Tibor Sekelj 2012:

1. Informi pri Tibor-jaro kaj lia literatura kreado bildstrirevuojn por produkti kaj aperigi bildstriojn pri la aventuroj de Tibor (tiusence necesus havi almenau kelkajn anglalingvajn tradukojn ĉefe de la verko Mondo de travivaĵoj. Iu anglalingva denaskulo devus fari tion almenau por la interreta uzo.
2. Informi TV-redakciojn kaj radio-redakciojn aparte en landoj kie Tibor lasis iujn spurojn por prezenti ion pri li. Apartan rolon havas la Zagreba kaj Novisada televidoj kaj verŝajne ankau la beograda, kiuj havas materialojn pri kaj de li.
3. Akiri la TV-intervjuon kun li kiun faris raportisto Hetrich en kroata televido por fari CD kiun oni povus prezenti kie ajn kun subtitola traduko okaze de prelegoj pri li.
4. UEA okazigu aranĝon aŭ esploron pri lia graveco por la 2-a UNESCO-rezolucio kaj lia agado por UEA en UNESCO-konferencoj.
5. EEU esploru lian gravecon por la evoluo de E-movado post la lanĉo de IOE (iom post ioma malneŭtraligo de la movado kaj ĉiam pli da apliko de E en praktikaj vivobranĉoj
6. Organizi simpoziojn pri lia
   - literatura kreado
   - ĵurnalismo
   - filozofio de la vivo tra liaj literaturaj kreaĵoj (poezio kaj prozo)
   - geografio kaj malkovroj
7. Prepari EU-financatajn projektojn kadre de Grundtvig, Komenius, eventuale aliaj
8. Organizi ekspoziciojn kun fotoj pri liaj vojaĝoj, libroj, etnografiaĵoj aŭ fotoj de ili
9. Eldoni tradukojn de liaj verkoj kaj ankaŭ E-ajn originalojn kaj uzi ilin dum la Europa Tago de Lingvoj (26. septembro) kaj en la tago de lia naskiĝo (14. februaro) proponante prezenton kaj intervjuojn ĉe televido, radio ktp.
10. Kontakti filmentreprenojn aŭ grandajn TV-produktantojn kiel Discovery kaj National Geografic por proponi produkti filmon au serion da filmoj pri li
11. Organizi rondajn tablojn kaj prelegojn, speciale kunlabore kun bibliotekoj kiuj havas almenaŭ iun lian libron (jam sinjoro Arno Lagrange preparis power-point bazon por tiaj prelegoj:
    https://doc-0k-40-docs.googleusercontent.com/docs/securesc/2do8t10ol3k6t1jifb163g5sd25mps7t/074ttievtv9oakuj3od3d3kih9thla1a/1317653100000/08502003088969316596/16629592213420089460/0B-AZ2gtlBh3qNmUwMTZiOWYtNTEzNS00NGY2LWI4MDUtMmViOTFmM2IxZGQ0?e=download&nonce=84isdk3pe9bpu&user=16629592213420089460&hash=mbbfpgo4jqkjlskspt9s411ov7a3lglr
12. Inviti Radio-staciojn prepari radio-novelojn (radio-dramojn) baze de liaj verkoj
13. Esperantistoj en landoj kie li loĝis serĉu revuojn kaj gazetojn el la tempo kiam li tie aktivis kaj trovu en kiuj li kunlaboris kaj en kiuj oni aperigis ion de kaj pri li kaj petu tiujn revuojn iel signi la 100-jariĝon, rememori pri li ĉu per reaperigo de tio kio iam estis en la revuo aŭ per novaj artikoloj.
14. Proponi al nacilingvaj eldonistoj (aparte tiuj kiuj jam antaŭe ion eldonis) eldoni novajn



au reeldoni iamajn eldonojn de liaj verkoj)
15. Organizi grandan kunlaboran kampanjon inter landoj en kies lingvo jam ekzistas Kumeŭaŭa – la filo de ĝangalo (en 24 lingvoj) por komuna noveldono de tiu libro kiel aparte valora libro por edukado de gejunuloj kaj ke ĉiuj petu ĉe sialandaj edukministerioj subtenon al tiu komuna multlanda kunlaboro, tiel ke la ministerioj rekomendu tiun libron en siaj landoj ke la eldonaĵo povu esti grandkvanta kaj influa (kiel sitempe faris la japana minsterio pri edukado).
16. Peti Google apud sia nomo signi la centjariĝon de Tibor la 14-an de februaro 2012. Pro tio kunlaborigi laueble multajn tradukistojn al laueble multaj lingvoj, traduki la vikipedian E-an artikolon pri Tibor Sekelj, kiu ricevu la statuson de fontlingva artikolo. Se Google akceptos tion, tiam la klako ĉe la nomo de Google la 14-an de februaro automate malfermos al la klakanto biografian artikolon pri Tibor en tieslingva vikipedio kaj se ni havos nesufiĉajn artikolojn – nun ekzistas en 25 lingvoj) la afero ne havos gravan reeĥon.
17. Se troviĝus interesitoj, oni povus stimuli malpli grandajn ekspediciojn laŭ liaj spuroj kiujn organizu nacilingvaj revuoj
18. Esperantistoj mem verku artikolojn pri li kaj liaj verkoj kaj proponu ilin al nacilingvaj gazetoj
19. Esplori pri liaj artikoloj en E-gazetaro kaj eldoni libron pri elektitaj artikoloj.

Zlatko Tišljar

NIAJ LANDAJ MOVADOJ
POLA ESPERANTO-ASOCIO – sojle je ĝeneralaj ŝanĝoj

Mia raporto priskribas ĵus ŝanĝiĝantan situacion de la movado en Pollando post la elekto de nova Ĉefa Estraro de PEA.
Nun vi ricevas opinion de „malnova prezidantino”, kiu gvidis polan landan Asocion dum pli ol tri kaj duono da jaroj, aktive ĉeestis multajn eventojn, iom mem organizis, kaj almenaŭ observis diligente ĉion gravan, priskribante tion en de mi dum 4 jaroj redaktata revuo Pola Esperantisto. Mi ne povas garantii ke miaj opinioj estas objektivaj, sed laŭ mi – veraj, kredindaj, „el la unua mano”.

La situacion de E-movado en Pollando en junio 2011 oni povas opinii kiel “meze bonan”. Ankaŭ ĉe ni la esperantistaro rapide maljuniĝas kaj la bona, tre ideema kaj sindonema generacio forpasas… Ilia loko tre ofte restas malplenigita, ĉar samtempe pli kaj pli mankas homoj kapablaj instrui novajn esperantistojn, de jaro al jaro malgrandiĝas nombro de E-kursoj, kaj ĝenerale – la nivelo de la lingvokono de esperantistoj (eĉ aktivuloj) draste malaltiĝas.

Tion mi observas en ricevitaj materialoj direktitaj al la Redakta Kolegio de Pola Esperantisto, sed ankaŭ dum E-aranĝoj, kie multaj – eĉ bonaj agantoj – ne scipovas paroli esperanlingve. Tiaj estas efikoj je manko de regulaj E-kursoj en ĉiuj filioj, rondoj, kluboj de esperantistoj. Kulpas senvizieco kaj malforteco de ILEI, tute ne okupiĝanta pri E- instruado dum multaj jaroj. Kompreneble, la plej gravan rolon en landa agado ludas ĝuste PEA, kiu ankaŭ ne havas de jaroj klaran planon de “instruado de instruistoj”. Sen kreado de forta enlanda instruistaro, nenia plibonigo de situacio eblas – instruistoj/instruantoj estas bezonataj en ĉiuj regionoj kaj lokoj, tio estas la unua kaj grava kondiĉo por ŝanco al kresko de E-movado.

Krom PEA , oni povas observi la aktivecon de kelkaj eksteraj E-organizoj: en Bjalistoko, Wroclavo, Olsztyn, de tempo al tempo – en Krakovo. Tion ni konstatas laŭ la ricevataj informoj al kroniko de regionaj eventoj en ĉiu numero de Pola Esperantisto, ĉar la revuo estas malfermita por la tutlanda E-movado. Sed mia tasko estas ligita kun informo pri PEA, tial sube vi havos skizan raporton, pri situacio de PEA meze de 2011-a jaro.

1. **Organizaj aferoj**

PEA estas de 2 jaroj leĝe establita neregistara organizo laŭ la pola juro, rajtigita same, kiel aliaj NRO en Pollando kaj en aliaj landoj de EU. Konsistas ĝi el 25 filioj, inter kiuj troviĝas la Pola Esperanto-Junularo, aliaj filioj estas regionaj. Ĉi-jare PEJ agas jam ankaŭ kadre de Pola Konsiliaro de Junularaj Organizoj, al kiu ĝi aniĝis.
PEA agas laŭ statuto aprobita en 2007a jaro, kaj oni spertis ties maltaŭgecon por eventuala memstariĝo de filioj – internaj paragrafoj ne permesas ke regionaj filioj de PEA memregu sin finance. Tial estis malebligitaj monsubtenoj por la agado el multaj fontoj, kiuj postulas certan sendependecon organizan kaj financan de monpetanto. Tio kaŭzas neceson ŝanĝi la statuton, se oni ne volas riski dispartiĝon de la tuta Asocio. Ankaŭ aliaj statutaj temoj indas ŝanĝojn, certe la nova Estraro pri tio zorgos.
Inter ekzistantaj regionaj filioj de PEA vere aktivaj estas nur kelkaj: Warszawa, Łódź, Gliwice, Bielsko Biała, Gdańsk, Nowy Sącz, Brodnica (nur unu faka agado - turismo, sed modela dokumentado…) Kelkaj filioj estas malgrandaj kaj malfortaj, kaj ekzistas eĉ tiaj sen signo de vivo, kie maljunaj anoj ne allogis posteulojn kaj ne kapablas aranĝi agadon en tute aliaj kondiĉoj de la postomunisma lando… Jam petis pri nuligo la filio en Kielce, oni nenion scias pri la agado en Poznan kaj Dąbrowa Górnicza. La nova Estraro de PEA devos aktualigi la mapon de Esperanta agado en Pollando.

2. Edukado

Malmultiĝas nombro de organizataj E-kursoj, tragika estas la situacio de la instruistaro. Fakte post la "grasaj" jaroj 70-80, kiam instruistoj estis amase preparataj en Bydgoszcz, jam ne revenis simila interesiĝo pri lernado de Esperanto, nek kreiĝis organizaj fortoj por krei similan centron de klerigado de instruistoj. Atestitaj antaŭ ĉ. 30 aŭ pli da jaroj gvidantoj de E-kursoj maljuniĝis kaj forlasas aktivan esperantistecon aŭ forpasas. Kia povas esti solvo de la situacio, se en la tuta lando ekzistas nun nur kelkaj aktivaj instruistoj – fakte instruantoj sen pedagogia rajtigilo?

Antaŭe mi esperis pri helpo flanke de ILEI – pri ricevo de iu ajna informo pri loko de instruista aktiveco: kiom da kaj kie troviĝas instrufortoj, kun kiaj kvalifikoj/atestiloj, kie estas lokoj kaj de ili organizataj kursoj, kaj fine – komune preparenda bilanco de bezonoj kaj eblecoj instrui Esperanton. Hodiaŭ mi scias, ke mankas klara strategio por agado kleriga kaj instrua, ĝuste tial oni ne povas kalkuli pri helpo flanke de ILEI-PL, se dum 4 la lastaj jaroj ne estis ordigita informa bazo pri instruistoj. Dum kunsidoj, kiujn mi partoprenis, ili parolis pri neceso eldoni novan lernolibron! Mi demandas – por kiuj?

Tial la edukado devas fariĝi unu el la plej gravaj taskoj por PEA. Se tio ne estos tuj organizita, la pola E-movado ne havos ŝancon travivi nunan "transgeneracian" ŝanĝon, kiam aktivaj instruistoj/instruontoj aĝas 60-80 jaroj, kaj neniu zorgas pri posteuloj… La movadon gvidas volontuloj, PEA ne havas eĉ unu dungiton, mankas homfortoj por vojaĝi tra la lando kaj ripari la situacion en multaj filioj. Savrimedo estas nur unu – kelkaj fortaj regionaj memstaraj organizoj, kunligitaj organize en Federacio, memzorgantaj pri financado de la agado per publika mono. Mi persiste tion ripetas, sed ofte sen reeĥo…, sen subteno.

Krom Nowy Sącz, kie daŭras konstanta instruado por "triaĝuloj" kaj infanoj, kaj nun oni komencas labori ankaŭ kun junulara grupo, mi povas konfirmi nur kursojn organizatajn de PEA Filio en Gliwice kaj Varsovio. Mi volonte ekscius pri la atingoj de aliaj regionoj… Danke al Partnereca Projekto Grundtvig en programo "Lernado dum la tuta vivo" gvidata de Halina Komar (kunordiganto) en 2010 el Pollando sukcesis KER-egzameniĝi 14 personoj, kelkaj el ili jam gvidas proprajn grupojn. El la sama monfonto estis fonditaj de PEA 2 stipendioj por Instruista Trejnado ĉe UAM Poznań. Tio montras, ke la situacio estas ne nur ŝanĝenda, sed ankaŭ ŝanĝebla, sed mankas homoj persiste strebantaj al celo, kiel en Nowy Sącz.

Bezonata estas granda inform-propaganda kampanjo, kun celo allogi novajn, klerajn esperantistojn – plej bone jam kun pedagogia klereco kaj atesto. Tion ni jam komencis fari en la socio de la Tria Aĝo, kio estas alternativa pro manko de junuloj, pretaj servi kiel kursgvidantoj. Esperiga estas iniciato de la nova Estraro de PEA en Varsovia Universitato, kie oni komencis aranĝi kondiĉojn por rajtigo de KER- ekzamenoj en Esperanto, egale kun aliaj lingvoj. Se tio sukcesus – iĝus nova ŝanco por allogi junularon al E-lernado. Kaj se aldone la propono direktita al ili estus interesa – eblus plifortigi la junularan parton de pola movado.

3. Informado kaj propagando

Sur tiu ĉi kampo, pola esperantistaro havas grandajn atingojn. Dum la lastaj 3 jaroj, esperantistoj uzas ĉiujn eblecojn por montri sian ekziston al ekstera mondo. Ni sukcesis alkutimigi regionajn filiojn al partopreno en diversaj lokaj eventoj: festivaloj, foiroj, forumoj, piknikoj, ekspozicioj kts. – kie civitanoj povas vidi kaj ekaŭdi pri nia lingvo kaj la movado. Krom disdonado de informiloj, oni ofte organizas konkursojn, gvidas E-lecionojn, prezentas prelegojn, filmojn aŭ artistajn programerojn… Do almenaŭ en kelkaj lokoj en Pollando la ekstera informado floras. Certe gvidan rolon plenumas Nowy Sącz, kie loĝantoj scias multe pri Esperanto kaj esperantista agado pro gazetaraj, radiaj kaj tv informoj – oftaj kaj simpatiecaj.

4. Agado



Nian agadon priskribas la organiza revuo **Pola Esperantisto** – jam 105-jara gazeto, kiu ĝuste dum 4 lastaj jaroj estas redaktata en Nowy Sącz kun helpo de samideanoj el diversaj regionoj kaj ne nur el PEA. La revuo fariĝis bildo de ĉiuj gravaj eventoj en pola esperantista mondo, tiamaniere ĝi estas vera kroniko de pola E-movado, fonto de informoj pri la stato de PEA kaj pri diversaj iniciatoj de aliaj organizaĵoj esperantistaj en Pollando dum 2008-2011.
De januaro 2012 ŝanĝiĝos la redakta kolegio, sed la gazeto plu servos por la tuta pola esperantistaro, kaj plu respegulos la tutan polan E-movadon.
Oni devas montri ankaŭ la organizan sukceson de la pasinta estrarperiodo, prepari bonegajn Tutpollandajn Esperanto-Kongresojn, antaŭe forlasitaj de PEA dum deko da jaroj. Ili okazis en Lodzo 2008 kaj en Nowy Sącz 2011.

5. Resumo

La plej grava atingo de la lastaj 3-4 jaroj de PEA, estas eliro el la esperantista getoo. Ni montris ekstere nian aktivecon kiel "aktivaj civitanoj", konvinkante aliajn, ke Esperanto estas unu el movadoj por publika bono kaj neniu stranga sekto, kiel ni antaŭe estis opiniitaj.Nun ni publike, per amaskomunikiloj kaj ĉeesto dum gravaj eventoj loke, regione, kaj tutlande – prezentas valorojn de la lingvo kaj allogas al la movado. Ni estas aktivaj ĉie: en agadoj kleriga, kultura, socia, turisma, karitata, volontula ktp. Tial ni estas sur bona vojo kun espero, ke plijunigita nova Estraro trovos ankaŭ rimedojn por allogi junularan generacion kaj sukcesos solvi grandan problemon de instruado en Pollando.

6. Aldone – pri pola Esperanto-movado

Oni devas ankaŭ priskribi la agadon de aliaj Esperanto-organizoj, institucioj aŭ aliaj E-subjektoj. Tio ne estas facila tasko, ĉar ne ekzistas en nia lando iu centro, okupiĝanta pri analizado kaj dokumentado de tiu ĉi kampo – estas konataj nur agoj, kiujn ni ricevis priskribitajn kiel materialoj al la revuo Pola Esperantisto. Pri aliaj faktoj ni nur povas supozi, hazarde aŭdante opinion aŭ reeĥon post iu aranĝo.

Certe la plej fortan agadon oni observas en Bjalistoko, firme establita de **Bjalistoka Esperanto-Societo**, **Centro nome de L.L.Zamenhof, Fondaĵo je la nomo de Zamenhof, Esperanto-Libraro** – la filio de la ĉefa regiona Podlaĥia Libraro. Bone organizita agado, multaj interesaj iniciatoj, tradiciaj festoj kunligitaj kun la Majstro, favora subteno de la urba kaj regiona registaro – tiaj fortaj faktoroj starigas la BES sur la 1a loko en pola E-movado. La teamon de bonaj agantoj estras Elżbieta Maria Karczewska.
Tuj post ili, oni trovas alian fortan esperantistaron, kunligitan de **Silezia Esperanto Asocio en Wrocław**. Tie estras energie Teresa Pomorska kun helpo de meritaj esperantistoj- honora prezidanto Adam Pleśnar, E.Wojtakowski kaj aliaj. Esperantistoj el Wrocław aktive partoprenas preskaŭ ĉiujn E-aranĝojn polajn kaj najbarajn, mem organizas ĉiujare semajnajn feriojn en Szczawno-Zdrój, kuracloko kie ripozis L.L. Zamenhof, kaj kie restis memoraĵoj de tiu ĉi vizito. Venontjare oni festos 100-jaran jubileon de tiea kuracado de Majstro dum la arangxo 2012.
Simpatie agas **Varmia-Mazuria Societo de Esperantistoj en Olsztyn**, proponante al samideanaro FREŜO-n, tre agrablan, gajan printempan semajnan renkonton en Olsztyn. Organizas ĝin fakte tri intergenaraciaj familioj: Frenszkowski, Gielert, Zdankowski. Dum la lerneja jaro en Olsztyna Universitato de Tria Aĝo oni gvidas la E- kurson.

Varsovian Venton – gvidatan de Irek Bobrzak, guruo por junularo, konas preskaŭ ĉiuj, ĉar li elpensis kaj dum multaj jaroj gvidis la Ago- Semajnojn, tre popularajn kaj eĉ amatajn de junularo finjarajn aranĝojn. Nune ĝi jam ŝanĝis la organizajn regulojn, fariĝis pol-germana, kaj la **Via Vento** pli okupiĝas pri E- muziko kaj filmado.
Krakova Societo Esperanto havas sian artan kaj literaturan flankon en pola E-Movado. Gvidas ĝin Lidia Ligeza, la ĉefa organizantino de Esperantaj Tagoj de Krakovo, kiu invitas nun ĉiujn al 100 – jara jubileo de la Krakova UK en 1912j. La festado okazos ĝuste dum la Esperantaj Tagoj de Krakovo 2012.
Internacia Klubo ESPERANTOTUR en Bydgoszcz tio estas faka organizo por edukado kaj turismo. Ĝi servas kiel AIS klerig-punkto kaj ankaŭ kiel **Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo**. Krome - organizas multajn vojaĝojn al E-aranĝoj en la tuta mondo.
Ankoraŭ ni aŭdas pri la **ĉe Jagiellona Universitato E-agado en Krakovo**, aranĝata de Maria Majerczak, sed oni ne konas detalojn de tieaj iniciatoj kaj agoj. Ne sciate, ĉu la organizo estas registrita aŭ nur bazita ĉe la Universitato.
Ĉu ekzistas aliaj, multnombre montritaj en E-adresaro, oni ne scias. Miajn informojn mi donas sur la bazo de ricevitaj materialoj dum 4-jara redaktado de Pola Esperantisto.
Oni povas aldoni ankoraŭ du polaj E-Eldonejoj privataj - Eldonejo KLEKS en Bielsko Biała de Georgo Handzlik kaj Eldonejo HEJME en Czeladz de Kazimierz Leja.

Aparte gravas la jam 7-jara agado ene de granda neesperantista aranĝo Ekonomia Forumo en Krynica, kie la esperantistoj de Nowy Sacz sukcesas ĉiujare (krom en unu jaro) organizi partoprenon de EEU kiel partnero kaj elstaran standon per kiu estas informataj multaj influaj personoj en Eŭropo pri Esperanto.

Halina Komar

PARTOPRENO DE EŬROPA ESPERANTO-UNIO EN EKONOMIA FORUMO EN KRYNICA

La Eŭropa Esperanto Unio (EEU), malgraŭ limigitaj financaj rimedoj, sukcese partoprenis jam la 6-an fojon en la 21-a Eŭropa Forumo (EF) en Krynica (Polando), la granda internacia evento tiel nomata „Davos en orienta Eŭropo“. Ĉijare partoprenis ĝin 2600 partoprenantoj, inter kiuj estis pintaj ŝtataj kaj politikaj reprezentantoj, kiel ankaŭ de entreprenoj, asocioj, akademiaj rondoj, neregistaraj organizaĵoj de Pollando, landoj kaj institucioj de EU, landoj de la Orienta Partnereco de EU (Ukrainio, Belorusio, Moldavio, Gruzio, Armenio kaj Azerbajĝano), Rusio kaj aliaj landoj de la mondo. Akreditaj estis 500 ĵurnalistoj. La ĉeftemo de la EF estis **„Eŭropa dilemo: partnereco aŭ rivalado?“**. Dum la forumo okazis 7 plekunsidoj kaj 150 diskutpaneloj. Dum la vizito de Donald Tusk, ĉefministro de Pollando,

Halina Komar sukcesis mallonge paroli kun li. Ŝi sukcesis informi lin pri Esperanto. Suprize li diris ke li eksciis pri ekzisto de Esperanto en Sopot (lia loĝloko) kaj eĉ menciis tiean E-monumenton!

En Krynica reprezentis EEU Halina Komar, Peter Baláž, Arkadiusz Zychewicz, kaj Jozef Reinvart. Agnieszka Mozer kaj Dorota Rodzianko okupiĝis pri la informa stando de EEU. Danke al personaj kontaktoj de Halina Komar al la ĉeforganizanto de EF, Instituto de Orientaj Studoj, kaj ŝia grandega klopodo, Esperanto kaj EEU estis eminente videblaj en EF, ĉar ĝia stando estis lokigita en la ĉefa konstruaĵo, kie okazis plenkunsidoj kaj partoprenantoj ne povis preteriri ne vidante grandan afiŝon de Esperanto kaj informojn pri EEU. La membroj de la EEU-teamo informis multajn partoprenantojn ĉe la stando, dum diskutpaneloj kaj personaj debatoj, disdonis multajn informmaterialojn pri Esperanto kaj diskutis pri antaŭenigo de plurlingveco kaj ebleco solvi lingvajn problemojn. La tuta ĉeesto de EEU (panelistoj kaj budo kun informiloj) estis kunfinancata de EEU kaj de UEA, sen kies financa helpo malfacilus la ĉeesto.

Kompare kun antaŭaj jaroj, EEU pro diversaj kialoj ne havis propran diskutpanelon, sed ĝiaj reprezentantoj estis enpaneligitaj en teme proksimaj podiaj diskutoj, kie ili havis eblecon informi panelistojn kaj ĉeestantojn pri ideoj de EEU kaj diskuti kun ili pri antaŭenigo de vasta plurlingveco, egalrajteco en lernado, uzado kaj evoluigo de lingvoj, respekto de lingvaj rajtoj, lernfaciliga rolo de Esperanto en studado de lingvoj, kiel ekzemple en la projekto „Lingvolanĉilo“, kiu estas modelo por EU.

Jozef Reinvart partoprenis en la diskutpanelo „*Demokratio en Eŭropo*“ en kiu li prezentis temon „*Civitana socia platformo de EU: civitanoj kontribuas al lingva demokratio*“. Enkonduke li akcentis, ke lingva egalrajteco estas fundamento de demokratio. Li informis pri

rekomendoj de 29 neregistaraj organizaĵoj (inter kiuj estis EEU) elirantaj de la Traktato de Lisbono ka Ĉarto de Fundamentaj Rajtoj. Ili proponis al la Eŭropa Komisiono fari ŝanĝojn en lingva edukado, lingva politiko kaj planado, socia inkluziveco, tradukado kaj terminologio, por esence ŝanĝi la ĝisnunan libermerkatan lingvan kaj kulturan politikon en EU. Tio signifas egalrajtigi ĉiujn lingvojn (oficialajn kaj neoficialajn) en edukado, uzado kaj ilia evoluado kaj samtempe rekomendis, ke EU bezonas unu lingvon por demokratia, ne diskriminacia kaj efika lingva komunikado je ĉiuj komuniknivelo j en EU. Opinioj de panelistoj pri demokratio en Eŭropo estis diversaj. Mota Pinta, Prezidanto de Komitato de Eŭropaj Aferoj de la Parlamento de Portugalio**,** konstatis, ke demokratio de komenco de la eŭropa integriĝo estis aplikita de supre. Nuntempe politika praktiko estas sub forta premo de merkataj fortoj, kiuj ne respektas demokratiajn principojn. EU membro-ŝtatoj atendas financajn, politikajn kaj demokratiajn alvokojn, kies solvoj devus esti direktitaj al ekvilibra federalismo. Plifortigon de demokratio li vidas en garantio de 4 liberecoj de EU por civitanoj (libera movo de homoj, varoj, servoj kaj kapitalo) kaj en plibonigo de kunlaboro de la Eŭropa Parlamento kun naciaj parlamentoj. Günter Krug, Vicprezidanto de la Kongreso de Lokaj kaj Regionaj Institucioj de la Konsilio de Eŭropo, akcentis ke en la eŭropa integriĝo nuntempe dominas ekonomio, kiu subpremas demokration. Elirojn el malfavora evoluo li vidas en plifortigo de la aliro „desube supren“ respektante subsidiarecon. Plifortigadon de demokratio oni devas komenci desube je loka nivelo. La eŭropa integriĝo ne koncernas nur 27 EU landojn sed 47 eŭropajn landojn. Oni devas komune serĉi eŭropajn solvojn, kiuj plene spegulus opiniojn de civitanoj. EU ne havas vizion por sia longtempa direktado kaj evoluo. Laŭ John Stevens, Membro de Konsilanta Kolegio de la Federacia Societo (The Federal Trust), ne estas klara difino de internacia demokratio, kiu deferencas inter okcidentaj kaj orientaj landoj. En Britio ekzistas daŭre konservita demokratio, kiun ne determinas civitanoj, sed meza tavolo de la socio. Li esprimis dubon pri kontribuaĵo de nova institucio de civitana iniciato, kiu ekfunkcios ekde la 1-a de aprilo 2012 kaj pri ebleco akiri demokration je eŭropa nivelo. En diskuto estis akcentita bezono de plifortigo de kunlaboro de la Eŭropa Parlamento kun naciaj parlamentoj, konstruado de civitana socio pere de konekto de civitanoj je loka nivelo ankaŭ pere de utiligo de la civitana iniciato, interkonekto de ambaŭ demokratiaj aliroj „desupre kaj desube“, plifortigo de plurlingveco de civitanoj inkluzive de grandaj landoj, precipe de Granda Britio. Ili estas unulingvaj „viktimoj“ de sukceso de propra lando, kaj malvenkas en konkursoj kun plurlingvaj civitanoj. Por plifortigado de demokratio en Eŭropo estas grava precipe edukado de juna generacio en lernejoj kiel ankaŭ de aliaj civitanoj al demokrata sintenado.

La membroj de la EEU-teamo partoprenis ankaŭ *Forumon de Tria Aĝo*, jam la trian fojon organizitan kadre de Ekonomia Forumo en Nowy Sącz. Tie kunsidis ĉ. 200 reprezentantoj de universitatoj de la tria aĝo el Pollando, Ukrainio, Belorusio, Litovio. Jozef Reinvart informis la ĉeestantojn pri la rekomendoj de la Civitana Socia Platformo por Plurlingvismo kun akcento al lernfaciliga rolo de Esperanto en lingvo- instruado kaj la Lingvolanĉilo. Tre

interesa prezentado estis tradukita al pola lingvo. Wiesława Borczyk, Prezidantino deTutpollanda Federacio de Universitatoj de Tria Aĝo, interesiĝas pri enkonduko de Esperanto en studprogramoj de la universitatoj de la tria aĝo. Nur en Pollando ili jam estas pli ol 300 inter pli ol 100 000 studantaj homoj „50+“ -aĝaj.

Peter Baláž aktive partoprenis en la diskutpanelo „*Forto de homoj, interreto kaj ŝanĝiĝanta mapo de la mondo*“, en kiu partoprenantoj diskutis pri forto kaj influo de interretaj informoj je homoj. Tiuj informoj ekmovis kuron de eventoj en norda Afriko, resp. informoj de paĝaro/portalo de Wikileaks malfermis diskutojn en multaj landoj pri sekretigitaj kaj taŭzitaj temoj. Partoprenantoj konstatis, ke tiuj ĉi informoj kaj eventoj ŝanĝas geopolitike la mondon. Malfermita restas demando, kiajn konsekvencojn tio havos por la estonteco de demokratio. Partoprenantoj havis diversajn opiniojn pri donitaj servoj de grandaj societoj kiel Facebook, Twitter aŭ Google kaj ebla manipulado de informoj. En sia diskutkontribuo Peter Baláž atentigis pri graveco de interreto en edukado kaj utiligo de ĝia grandega potencialo. Li informis, ke surbaze de 9-jara sperto de senpaga interreta instruado de Esperanto societo E@I preparis plurlingvan prov-modelan programon por instruado de la slovaka lingvo. Krome, ĝi donadas kompleksajn informojn pri Slovakio (kulturo, historio, naturo, socio, entreprenado, ktp.) www.slovake.eu kunfinancita de la Eŭropa Komisiono. Tiu ĉi sukceso stimulis E@I al preparo de similaj projektoj por instruado de la germana, „Germana Enrete“ (Deutsch Online), kiun ankaŭ finance subtenis la Eŭropa Komisiono, ke estas jam preparita simila projekto por instruado de la rusa kaj projektataj estas pluraj aliaj lingvo-edukaj projektoj. Tiuj ĉi informoj vekis intereson de pluraj ĉeestantoj pri kunlaboro je similaj lingvaj projektoj kun kiuj E@I kunligis laborkontaktojn.

En kultura parto de la Foruma programo, la grupo de junaj kantistinoj de Nowy Sącz, prezentis kun granda sukceso koncerton „*Vento el Montaro*“ kiu en la unua parto prezentis al cento da homoj en Esperanto polajn popolkantojn kaj en la dua parto montris, ke esperantistoj subtenas vastan plurlingvecon de Eŭropo, kantante famajn kantojn en pluraj lingvoj. La spektantaro estis informita, ke tiamaniere estas prezentata riĉa multkultureco de Eŭropo, kiun ĝuste Esperanto povas savi kiel neŭtrala pontolingvo.

Laŭ la EEU-teamo, ĉijara partopreno en la EF estis sukcesa kaj rekomendas por la venonta jaro sufiĉe frue antaŭ la EF enpaneligi siajn membrojn en teme proksimaj diskutpaneloj. En ili estas eminenta ebleco prezenti al ekstermovadanoj ideojn kaj rekomendojn de EEU, stimuli tuteŭropan diskuton pri subteno por vasta plurlingvismo, prezenti rolon de Esperanto en egalrajtigo de ĉiuj lingvoj kaj demokratiigo de lingva kaj kultura politiko en Eŭropo.

Josef Reinvart

ĈU "NITOBE-RAPORTON" POR EUROPA UNIO?
Ni havu oficialan EU-dokumenton!

En la retejo de EU kaj en diversaj eldonoj de Eŭropa Bulteno aperis multaj materialoj pri la eŭropa lingvo-problemo kaj pri la agado de EEU. Mi do ne devos analizi la lingvo-politikan situacion de EU kaj remaĉi faktojn konatajn al la bonvolaj legantoj.
Tamen pri unu aspekto mi volas insisti:

Oficiala statuso por Esperanto ne baldaŭ atendebla
Ni verŝajne devas realisme akcepti, la fakton, ke dum proksima tempo oni ne povos atendi iun ajn oficialan statuson de Esperanto en la lingvo-politika pejzaĝo de Eŭropa Unio. Mi scias, ke jen kaj jen aperas similaj esperoj. Tamen ekzistas pluraj juraj kaj politikaj kaŭzoj por tia situacio, kiu por kelkaj esperantistoj eble estas iom senesperiga.
Oficiala lingvo de EU devas esti lingvo de difinita ŝtato-membro. Ĝis nun tio ankaŭ koncernis la statuson de laborlingvo, kiu – almenaŭ formale – povas esti identa kun la oficiala lingvo de ŝtato-membro. Krom tio lingvo-politikaj decidoj pri akcepto de difinita lingvo ĝenerale nur eblas, se ĉiuj ŝtato-membroj pozitive interkonsentas. La internacia politika klimato nuntempe ankoraŭ ne permesas akcepton de politike neŭtrala lingvo.
Tamen, kiel montras la lerta laboro de EEU, ne laste lige al la "Platformo", ja certagrade eblas ankri Esperanton en diversaj dokumentoj, diversmaniere informi gravajn funkciulojn, foje aranĝi ekspoziciojn aŭ eĉ kolokvojn ktp., do kontribui al tio, ke influhavaj intelektuloj kaj politikistoj (tio ne nepre ĉiam estas la sama) havu bazajn informojn pri la lingvo kun sia lingvo-komunumo.
Do, tio, kio eblas en la nuna situacio, estas informi, ke Esperanto kun sia lingvo-komunumo ne nur ekzistas kaj evoluadas, sed estas plenvalora kaj taŭga por praktika apliko.

Neinformiteco: La kutimaj argumentoj
Ni ĉiam denove spertas, ke lige al iniciatoj favore al Esperanto ekz. de unuopaj parlamentanoj reaperas ĉefe jenaj argumentoj:

1. EU uzas kaj subtenas nur la oficialajn kaj laborlingvojn (certagrade ankaŭ tiujn de la minoritatoj) de siaj membro-ŝtatoj.
2. EU estas por multlingveco kaj principe kontraŭ unusola lingvafrankao.
3. EU en sia lingvo-politiko limigas sin al la "naturaj", "vivaj" lingvoj, sed ne okupiĝos pri la "artefaritaj", kiuj ne havas kulturon.

Pri la dua punkto estas klare, ke la ofta prediko pri la multlingveco de EU estas pia deziro, ofte nur rutina aserto, ĉar la tendenco en la praktika lingvo-uzo iras ĝuste al unusola lingvafrankao, la angla.

Piednoto en la raporto de Ján Figel kaj kelkaj komentoj
Ni iom okupiĝu pri la tria punkto, ĉar ĝi ĉefe rilatas al mia propono. Pri ĝi en grava lingvopolitika dokumento, kiu ellaboriĝis sub la respondeco de la siatempa komisionano pri multlingveco, la slovako Ján Figel, oni trovas ŝajne sensignifan piednoton, kio tamen estas tute ne sensignifa, sed fundamente grava, eĉ simptoma:[1]

[1] http://eur-lex.europa.eu/LexUriServ/LexUriServ.do?uri=COM:2005:0596:FIN:EN:PDF (6.9.11)

En la piednoto 5 de la dokumento oni legas:

> *"Understanding of other cultures comes from learning the languages that give expression to those cultures; that is why the Commission does not promote the use of artificial languages which, by definition, have no cultural references".*
> (La kompreno de aliaj kulturoj radikas en la ellerno de la lingvoj, kiuj estas esprimo de tiuj kulturoj. Pro tio la Komisiono ne subtenas la uzon de **artefaritaj lingvoj**, kiuj **per difino** ne havas **kulturajn rilatojn**.- elstarigoj miaj-DB).

Jen mallongaj komentoj:

1. Oni povas dubi, ke la kompreno de aliaj kulturoj vere radikas nur en la ellerno de la lingvoj de tiuj kulturoj. Tio ja signifus, ke la informiĝo pri alilingvaj kulturaj valoroj helpe de tradukoj, instruado, perado de amaskomunikiloj, eketronikaj instrumentoj ktp. estus sensignifa.
2. La adjektivo "artefarita" ĉe lingvoj havas negativan konotacion (kunsignifon).
3. Bv. rimarki la pluralon "artefarita**j** lingvo**j**". Tio signifas, ke oni ne distingas projektojn disde funkcianta lingvo.
4. Oni asertas, ke iu *difinis* ion. Kiu difinis? Certe ne la kompetentaj fakuloj, la interlingvistoj kaj esperantologoj.
5. Eble – por iuj surprize – oni povus aserti, ke neniu lingvo "havas" kulturon. La aserto, ke lingvo "havas" kulturon, estas simple metafora esprimo, kiu subkonscie povas misgvidi. Jes, lingvo estas parto de la homa kulturo. Sed la kulturon kreas, havas, portas, pludonas la lingvo-komunumo. Kulturo reflektiĝas kaj konserviĝas i.a. en lingvoj. Pere de lingvoj oni pludonas prikulturajn informojn al nuntempuloj kaj estontaj generacioj.. En la lingvo mem, aparte en la leksiko, konserviĝas prikulturaj informoj.
   Laŭ tio, jes, Esperanto ne "havas" kulturon, sed ja ties lingvo-komunumo. Kaj la anoj de tiu ĉi lingvo-komunumo portas elementojn de siaj naciaj kulturoj, de la monda kulturo kaj de la originala kulturo, pri kiu disponas nur la Esperanta lingvo-komunumo mem.

Do, la ĉefa eraro de Figel kaj de aliaj simile argumentantoj estas, ke ili ne distingas inter lingvo-*projekto* kaj *lingvo kun komunumo*. Ni ĉi-tie ne volas pritemi la avantaĝojn kaj mankojn kaj specifaĵojn de la Esperanta lingvo-komunumo. Gravas, ke ĝi ekzistas kaj evoluadas rimarkinde.
Tio en si mem senbazigus la menciitajn argumentojn kaj asertojn. Sed ili tamen daŭre reaperas.

Ni havu oficialan dokumenton!
Laŭ mia opinio ni ne nur devus ligi la sci-akiron pri Esperanto al la unuopaj agadoj, aktivaĵoj ktp., kiuj sendube estas valoraj. Ni devus ankri la kiel eble plej objektivajn informojn en iu *oficiala dokumento de EU*, ĉu de la Parlamento, de la Komisiono aŭ de alia instanco. Tiu al mi ŝajnas ne senŝanca, kontraste al diversaj aliaj projektoj.

Tian projekton mi provizore volas nomi "Nitobe-raporto por Eŭropa Unio", aludante al la fama priesperanta raporto, kiun la japano NITOBE Inazo (1862-1933), post vizito de la 13-a Universala Kongreso 1921 en Prago, prezentis al la Ligo de Nacioj. Lia raporto fariĝis oficiala dokumento de la Ligo. La esperoj de la esperantistoj, ligitaj al tiu raporto, ne plenumiĝis. Pro pure potencpolitikaj kialoj, kiuj havas ĉiam ankaŭ lingvo-politikan aspekton, ĝi malaperis en iu komisiona tirkesto. La raporto tamen siatempe estis publikigita en kelkaj lingvoj kaj sendube helpis al objektiva informado pri Esperanto en diversaj landoj.

Se aktuale ekzistus iu tia oficiala dokumento de EU-instanco, oni povus citi ĝin kaj pli facile ol nun senbazigi la kutimajn argumentojn. Ĝusta informo estas la unua paŝo al sekvaj. Eble oni povus argumenti, ke ja ekzistas sufiĉe da bonaj libroj pri Esperanto ktp., kaj ke eblus informiĝi per ili ktp. Nu, pri tio ne temas. Gravas la oficialeco de EU-dokumento, eĉ se ĝi enhavus nur tute banalajn faktojn, kiuj al esperantistoj ŝajnus ne vere novaj. Tamen temos pri *faktoj*. (Cetere, tiom da vere bonaj diverslingvaj libroj pri Esperanto bedaŭrinde ne ekzistas…).

Tiu "Nitobe-Raporto", povus havi la senkomplikan provizoran titolon "Raporto pri la nuna stato kaj potencialo de Esperanto kiel internacia komunikilo", aŭ simile.

Kelkaj ŝtupoj al la Raporto

Eblus imagi jenajn ŝtupojn en la realigo de la projekto:

1. Veko de kompreno pri la graveco de la projekto en la aktivularo de EEU kaj en decido-influaj medioj de la esperantistaro.
2. Ellaboro de la projekto (nepre ne de kompleta teksto de la Raporto) tiom, ke ĝi estus prezentebla al eventualaj subtenantoj.
3. Serĉo de influhavaj subtenantoj de la ideo unuavice en la strukturo de EU. Eble troviĝus iu “s-r[in]o EU-Nitobe”, kiu povus lanĉi la ideon, trovi subtenon kaj la pretecon flanke de EU-instanco, mendi, resp. peti tian la Raporton.
4. Post principa akcepto de la projekto gravas trovi kompilantojn de la Raporto. Tiuj ne povus esti “kutimaj” esperantistoj, reprezentantoj de landaj asocio ktp., verŝajne eĉ ne reprezentantoj de EEU. Oni devus trovi fakulojn kun internacia prestiĝo laŭ la kalibro de Umberto Eco, François Grin, Robert Phillipson ktp., kiuj ne estus denunceblaj kiel “malobjektivaj esperantistoj”. Ĉi-rilate ni renkontas interesan fenomenon. Pri nuklea fiziko sin rajtas esprimi unuavice nuklefizikistoj. Pri la angla lingvo science okupiĝas anglistoj ktp.
   Sed se temas - ekster la esperantista medio - pri scienca pritrakto de Esperanto, oni ne malofte renkontas la argumenton, ke esperantistoj estas partiecaj kaj pri la temo devus okupiĝi senpartiaj sciencistoj neesperantistaj.
   Do, la Raporton devus verki kompetentuloj kun klara scienca prestiĝo de fakulo. Inter ili povus esti universitate kvalifikitaj interlingvistoj kaj esperantologoj, kiuj povus ellabori la unuan malneton por diskuto.
5. Post certa fina redaktado la Raporto estu prezentata al la mendinta EU-instanco por aprobo kaj oficialigo kiel EU-dokumento.

Tia Raporto, se oficialigota, certe ne kondukos al "akcepto" de Esperanto en EU (kion ajn oni komprenu sub "akcepto"), sed ĝi estus grava referenca materialo, kiu almenaŭ malfaciligus la ĝenerale netrafajn kaj absurdajn ideojn, kiujn la plej multaj koncernitoj en EU ligas al Esperanto. Ĝi donus fidindan bazon por pluaj paŝoj, eble ne nur en Eŭropo.

Detlev Blanke (detlev@blanke-info.de)

GIORGIO NAPOLITANO CITIS ESPERANTON EN RUMANUJO

La itala ŝtatprezidanto Giorgio Napolitano oficiale vizitis Rumanujon en septembro.

La rumana ĉefministro oficiale renkontis la italan respublikan prezidanton dum grava aranĝo. Komence la rumana ĉefministro sin adresis al la itala prezidanto demandante en la angla ĉu li preferas uzi la anglan aŭ uzi traduk-servojn.

Prezidanto Giorgio Napolitano, profunda konanto de la anglaj lingvo kaj kulturo, respondis tute trankvile en la angla: "Kiel Vi preferas. Ni povas paroli Esperanton, aŭ la anglan, aŭ la italan aŭ la rumanan".

La rumana ĉefministro, post rideto, agnoskis ke italoj kaj rumanoj, parolante la propran lingvon, povas kompreniĝi (alude al la komunaj latinaj radikoj).
La tuto estas spektebla en la rumana televido che http://www.antena3.ro/politica/premierul-boc-ironizat-de-presedintele-napolitano-i-a-propus-sa-vorbeasca-in-esperanto-136970.html .
La rumanaj ĵurnalistoj en pluraj rumanlingvaj ĵurnaloj skribis, ke la itala respublika prezidanto, Giorgio Napolitano, ŝercis kaj ofendis ilian ĉefministron. Rumanaj esperantistoj konfirmis, ke ne estas tre bona rilato inter la ĉefministro kaj la gazetaro, kaj ke ĉiu okazo estas utiligata por kritiki lin.

Efektive la itala respublika prezidanto (cetere: alta protektanto de la UK Florenco 2006 kaj tiam tre informita pri Esperanto) elmontris grandan volon aŭskulti. Lia ŝerca diro estus interpretebla jene: "Mi ege deziras paroli. Ne gravas kiun lingvon ni uzos, kondiĉe ke ni komuniku"!. Temas esence pri diplomatia maniero inviti al dialogo.

La plej ĝoja afero por italaj esperantistoj estas, ke la ŝatestro scias, kio estas Esperanto kaj ke li ne hezitas mencii ĝin.

Renato Corsetti

INFORMA KAMPANJO DE BRITA E-ASOCIO LIGE AL UK

Mi alkroĉas grandan liston de BBC Radio-intervjuoj, rezulte de nia informado pri la Kopenhaga Kongreso.
Elstaras lau mi la unua Televida programo en la skotgaela lingvo, per BBC Scotland. Milionoj da britoj aŭskultis pri Esperanto rezulte de la informado pri la Universala Kongreso kaj pri la datreveno de la 26-a julio (Esperanto-Tago). Mi esperas ke tiu agado kuraĝigos aliajn landojn uzi la 125-an naskiĝtagan datrevenon venontjare.
http://www.esperantolobby.net <http://www.esperantolobby.net/>

<http://skydrive.live.com/redir.aspx?cid=76d82196d8a9487e&page=view&resid=76D82196D8A9487E%21253&type=3&Bpub=SDX.Docs&Bsrc=Docmail&parid=76D82196D8A9487E%21252&authkey=cVpIfn4BsfA%24>

Brian Barker

MALLONGA RESUMO DE LA DOKUMENTO DE PLATFORMO PRI MULTLINGVECO

La Platformo de la civila societo pri Multlingvismo estas dokumento aranĝita en junio 2011 de scienc-teknika komisiono taskigita de Europa Komisiono. La sekvan monaton EK publikigis en sia retejo tiun gravan raporton pri multlingvismo en la Unio.
La dokumento en pluraj punktoj favore referencas al Esperanto. Tiu rezulto venis el kunlaboro de lingvistoj kaj spertaj esperantistoj, sub gvidado de Seán Ó Riain: ja per tiu dokumento Esperanto akiris ĉe EU gravan agnoskon rilate al ĝia utilo en lernado de aliaj lingvoj.
La dokumento “Politikaj rekomendoj por la promocio de multilingvismo en EU” estis redaktita de 29 organizoj el tuta Eŭropunio kaj en multaj punktoj parolas favore al ebla rolo de Esperanto cele al multilingvismo.
Jen la anglalingva raporto: http://ec.europa.eu/education/languages/pdf/doc5088_en.pdf
Ankaŭ elŝutebla el http://www.megaupload.com/?d=6XJQSDVM

Unu el rekomendoj invitas science enketi kiu lingvo, lernita kiel dua lingvo, plej efike helpas la lernadon de tria lingvo; kaj tiu rekomendo referencas rekte al raporto pri la brita projekto “Springboard to Languages”. El la 7 cititaj ekzemploj de “plej bonaj praktikoj”, 2 baziĝas sur la uzo de esperanto. La raporto interalie evidentigas:
- la lingvan rajtegalecon kaj la fakton ke la regado de kiu ajn nacia lingvo havas multajn negativajn konsekvencojn sur la aliaj lingvoj kaj ties parolantoj;
- ke la literaturaj tradukaĵoj al Esperanto estas kutime faritaj el la gepatra lingvo, tute male al kutimoj en aliaj lingvoj.

La reprezentantoj de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) en la Platformo estis Seán Ó Riain, Jozef Reinvart kaj Maja Tišljar. Ni ĉiuj estas dankaj por ilia prudenta, diplomateca kaj efika agado. Nombrante kiom da fojoj oni mencias la vorton Esperanto en la dokumento, ni atingis la nombron 76.

Rinaldo de Padova.

EŬROPA SEMINARIO DUM LA ITALA E-KONGRESO EN TORINO

La 78-a Itala E-Kongreso ĉi-jare okazis en Torino de la 20-a ĝis la 27-a de aŭgusto. Kial la loko Torino? Nicola Minnaja, respondeculo pri la kultura programo, klarigis enkonduke ke antaŭ 150 jaroj formiĝis kiel nova regno Italujo kun la ĉefurbo Torino. La tuta lando nuntempe festas tiun jubileon kaj pro tio oni elektis Torinon kiel kongresan renkontiĝejon. Siatempe patriotoj formulis la sloganon:"Farinte Italujon, nun ni faru la italojn". 150 jarojn poste la politika situacio en Eŭropo tre similas. Pro tio la organizantoj de la kongreso elektis jenan sloganon:"Kaj nun ni estu eŭropanoj".

Dum la tuta kongressemajno okazis multspecaj prieŭropaj aranĝoj: Seminario A sub gvido de Bertrand Hugon (historio de Eŭropa Unio, kultura kaj lingva diverseco, kiel akiri eŭropan identecon), publika diskuto inter pluraj gravaj fakuloj pri la temo:"Lingvo: ĉu faktoro por unuecigo aŭ divido". En tiu rondo ekzemple Probal Dasgupta (prezidanto de UEA) parolis pri la situacio en Barato kun 23 oficialaj lingvoj. Alia diskuttemo estis la oficiala lingvouzo en EU kun diskriminacio de la lingvoj de malpli grandaj membroŝtatoj. Fakte en la 27 ŝtatoj de EU ekzistas 23 oficialaj lingvoj.

Eĉ antaŭ noktomezo ni povis ĉeesti plurfoje interesan prelegon kaj diskuton fare de Davide Astori, lingvisto de la universitato de Parma, pri Zamenhof kiel profeto de Eŭropo.

Mia edzino kaj mi kune kun pli ol 250 kongresanoj el 30 landoj ege ĝuis la etoson dum la tuta semajno. La buntega programo de mateno ĝis post noktomezo inkluzivis ege variajn ekskursojn al la urbo Torino kaj al imponaj vidindaĵoj en la piemonta regiono, internacian vesperan muzikprezentadon, diversnivelajn Esperanto-kursojn, KER ekzamenojn, noktan junularan programon, teatraĵojn ktp.

Krom tio speciale menciinda estas la seminario B fare de Paul Gubbins: Esperanto dramarto-la unua jarcento. Dum 5 matenaj kunvenoj ni lernis multe pri dramaturgio kaj Paul kuraĝigis nin mem aktori en malgranda rondo.

Resume mi nur povas rekomendi nepre partopreni la venontjaran Italan Kongreson, kiu okazos en Sicilujo "Mazara del Vallo".

Dieter Kleemann

AKTIVECOJ DUM LA EŬROPA TAGO DE LINGVOJ

Ni aperigas ĉi tie mallongajn raportojn pri la agado okaze de la Tago de Eŭropaj Lingvoj. Ni havas informon ke okazis aranĝoj ankaŭ en Italio, Svedio kaj Germanio.

Raporto de Edukado.net
Kadre de la kampanjo Eŭropa Tago de Lingvoj (26a de septembro) la Konsilio de Eŭropo produktis glumarkojn en diversaj lingvoj, kiujn ili publikigas en sia paĝaro.
En printempo 2010 nia kolego, Frank Huber kontaktis la respondeculojn kaj akiris por edukado.net la permeson krei la Esperanto-version de la glumarko kaj tiun disvastigi pere de nia paĝaro.
La grafikaĵon vi trovas ĉe la paĝo: http://edukado.net/novajhoj?id=167
Klaku al la simbolo kaj vi povos tuj vidi la klarigon kaj elŝuti al dokumenton kun pluraj versioj de la insigno.

Katalin Kovacs

Raporto pri agado de UFE
En Francio estis dissendita gazetara komuniko okaze de la tago al la kutima adresaro de gazetoj. Vi povas legi gxin cxe niaj retpagxoj cxe
http://esperanto-france.org/IMG/pdf/2011-09-23-Journee-euro-langue.pdf
Okazis Malfermaj Tagoj cxe la sidejo de Espéranto-France, la 23-an, 24-an kaj 26-a de septembro. Ilin organizis la francilia federacio (t.e. la regiona federacio). Estis ekspozicio de libroj, prelego de HORI Jasuo kaj koncerto de JoMo.
Venis angla raportistino de Radio France Internationale, kiu intervjuis kelkajn homojn; rezultis 4minuta elsendo, kiun vi povas auxskulti cxe
http://www.english.rfi.fr/france/20110926-esperanto-international-language

Claude Nourmont

Raporto el Britio
Ni kontaktis naciajn kaj regionajn ĵurnalojn per blogaĵoj - jen unu ekzempla rezulto
http://www.guardian.co.uk/teacher-network/2011/sep/26/european-day-languages-teaching-resources?newsfeed=true

Ni kontaktis ĉiujn britajn membrojn de Eŭropa Parlamento kaj per sia muro ĉe la respektiva Facebook/Feksbuk paĝo, kaj rekte per reto. Ni informis ke UEA ĝuas konsultajn rilatojn kun la "Konsilio de Eŭropo" por konigi nian oficialan statuson. Jen unu el la reagoj:

EUROPEAN PARLIAMENT

MEMBER OF THE EUROPEAN PARLIAMENT
IAN HUDGHTON
SCOTTISH NATIONAL PARTY

Mr Francis Lee
Parliamentary Liaison Officer
Esperanto Lobby
4 Lang House
Ward Road
LONDON
N19 5ED

25 February 2011

Dear Mr Lee

Esperanto

Many thanks for your letter of 15 February and for enclosing a copy of the booklet "Discover Esperanto".

I was very interested to read about the origins surrounding Esperanto as well as the profiles of Esperantists and their experiences of learning and using the language.

As I am a member of the Scottish National Party and an MEP in the European Free Alliance group you will not be surprised that I am a strong advocate for minority languages such as Scots, Gaelic and Esperanto.

May I extend to you and your fellow Esperantists my best wishes.

Yours sincerely

Ian Hudghton, MEP

pp

Ni ankaŭ kontaktis EP-anojn je loka nivelo t.e. pere de lokaj voĉdonantoj.
Brian Barker

David Curtis skribis al sia eŭropparlamentano Ashley Fox okaze de Eŭropa Lingva Tago kaj ricevis jenan respondon:

From: Ashley Fox

Sent: Tuesday, September 27, 2011 1:14 PM
To: david.r.curtis@btopenworld.com
Subject: FW: European Day of Languages

Dear David,
Thank you for coming back to me so swiftly. I would consider myself British before European. As such my loyalty is to Britain, therefore the only anthem I sing is our own National Anthem. I do not sing the European National Anthem, as I do not believe that the European Union is a Nation, I do however try and show respect to those that do wish to sing it by standing with them, as I would of any National Anthem.
I do my best to represent the South West to the best of my ability, but on this issue we disagree. We do agree on issues, such as the importance of learning foreign languages, but on this one we do not.
I cannot answer your question as to whether my being part of a Party or Grouping effects my views, there is no Group Whip to act in any particular fashion in this regard, rather it is a decision I have reached myself.
I hope that this answers your questions.
Yours sincerely,
Ashley

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.
Finredaktita: la 30-an de septembro 2011
Redaktoro: Zlatko Tišljar
En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Halina Komar, Jozef Reinvart, Detlev Blanke, Claude Nourmont, Renato Corsetti, Dieter Kleemann, Rinaldo de Padova, Brian Barker, David Curtis.
Kontakto: ztisljar@gmail.com
Retpaĝo: http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno